

Esperanto-Informilo

65-a jaro

por Berlin kaj Brandenburgio

n-ro 664, 02-03/2015

Salutvortoj 2015

Karaj membroj de EABB kaj ELB, nuntempe regas kelkaj grandaj ŝanĝoj en la Esperanto-vivo de Berlino kaj Brandenburgio, kiuj signifas novajn defiojn por ĉiuj. La nova jaro komenciĝis kiel la pasinta finiĝis, kun diversaj surprizoj kaj novaj ideoj.

I.a. nia prezidanto Felix Zesch malmembrigiĝis subite kaj pro tio mi, kiel anstataŭanto, transprenis la negocojn. Tiukadre mi dankas al li pro la bona laboro. Li simple portis freŝan venton en nian asocion, por kelkaj eĉ tro freŝan. Li havis multajn interesajn ideojn, el kiuj ni ne sukcesis realigi ĉiujn.

Alia grava afero estas la pasintjara decido de Germana Esperanto-asocio transloki la oficejon el la Esperantodomo al iama vendejo en Katzbachstraße. Nun okazas la realigo de tiu ĉi decido kaj tio kaŭzas demandojn, kiuj rilatas nin ĉiuj. Ekzemple, kio okazu kun la granda projekto Esperantodomo, speciale kun la ĉambroj, kiujn uzadis ankaŭ ELB kaj EABB por kunvenoj kaj aranĝoj? Ĉu ni povos uzi la ĝardenan domon por niaj celoj, kiu bezonas debazan rekonstruiĝon?

Malgraŭ ĉio ni denove havos diversajn aranĝojn, kiujn ni mem organizos aŭ simple partoprenos. La unua evento jam estos la jara ĉefkunveno 2015, kiu okazu dum februaro (la

“La nova jaro komenciĝis kiel la pasinta finiĝis, kun diversaj surprizoj kaj novaj ideoj.”

invitilon kaj informojn vi trovas ĉi-kajere), kaj dum kiu ni ankaŭ elektu novajn estrarojn por EABB kaj ELB. Ekzemple ni festu sur la Esperantoplaco en Berlin-Neukölln kaj ĝuos interesan Zamenhof-feston dum decembro. Multaj el ni certe partoprenos la Germanan Esperanto-Kongreson en Hameln. La franca urbo Lille invitas al la 100-a Universala Kongreso de Esperanto kaj niaj amikaj grupoj en Pollando kiel ankaŭ de la najbaraj federaciaj landoj invitas al diversaj interesaj aranĝoj.

Grava tasko estas la regula aperado de nia informilo, kiu raportu pri niaj celoj kaj atingoj. Same gravas la prezen-tiĝo en la interreto, kies daŭra aktualigo ankaŭ i.a. helpu al la informado pri kaj disvastiĝo de Esperanto en nia regiono.

Ni uzu ĉiujn eblecojn, kiujn donos al ni la estonteco kaj mi esperas, ke ĉiuj samideanoj kunlaboru. La estraro mem ne kapablas fari ĉion. Ĝi nur povas doni la bazon.

*Amike,
Ronaldo*

In eigener Sache

Auch hinter den Kulissen des Informilos hat sich mit dieser Ausgabe einiges geändert. Der Produktionsprozess wurde auf das plattformübergreifende, quelloffene Satzprogramm Scribus umgestellt und damit die erste Grundlage für ein professionelleres Erscheinungsbild gelegt.

Da das Informilo nun regelmäßig alle zwei Monate erscheinen soll, wurden

bereits im Vorhinein die Termine für den jeweiligen Redaktionsschluss bekannt gegeben. Ebenso gibt es eine neue Mailingliste für alle Autoren und fleissigen Helfer, ohne die es das Informilo schließlich nicht gäbe. Alle Interessenten sind eingeladen, der Liste unter *informilo-eabb@googlegroups.com* beizutreten.

Marc Hanisch

Peter Bäß 75-jariĝis

Nerimarkite en la historia tago 9a de novembro ĉi-jare aktiva Neuköllna esperantisto povis festi jubilean naskiĝtagan datrevenon.

Peter ĝis la emeritiĝo longatempe estis pastro ĉe la evangelia Nikodemus-preĝejo en Neukölln. Dank al tio brilaj Esperanto-aranĝoj okazis en tiu ĉi preĝejo, ekzemple surscenigo de teatraĵoj kiel »La Arkitekto kaj la Imperiestro de Asirio« de Fernando Arrabal en 1990 fare de la teatra trupo Kallima kaj en 1994 »Aniaro« de Harry Martinson en traduko de William Auld, prezentita de Jerzy Fornal. Okazis tie koncertoj, literaturaj vesperoj, prelegoj, festoj k.t.p. Peter gvidis kursojn, celebriis deservojn en Esperanto, kulture pliriĉigis ofte per muzikado niajn eventojn, instigis la Klecmer-muzikgrupon, en kiu li membras, elpaŝi en Esperanto-aranĝoj, gastigis Esperanto-geamikojn vizitantajn Berlinon kaj gvidis Esperanto-Ligon Berlino kiel prezidanto en la jaroj 2002 ĝis 2005. Estis la



*Peter muzikas dum la malfermo de la ekspozicio
»111 jaroj Esperanto en Berlino kaj
Brandenburgio« (2014)*

tempo, kiam ELB fariĝis registrita asocio (2002), festis 100-jariĝon de Esperanto en Berlino (2003) kaj hejmiĝis en Esperanto-domo en Lichtenberg. Certe mia mallonga priskribo de lia agado estas nekompleta sed videbligas, ke li apartenas al la tre aktivaj kunaranĝantoj de Esperanto-kulturo en Berlino kaj meritas okaze de la 75-jariĝo nian dankon.

Fritz Wollenberg

Forpasis tri GDREA-membroj en 2014

Manfred Arnold, 1928-2014

Nur nun mi ekciis, ke jam la 26-an de marto 2014 forpasis Manfred Arnold (nask. 10.2.1928) en Berlin. En GDR li laboris en la Ministerio por Ekstera Komerco. Pri Esperanto li eksciis de Rudi Graetz. Manfred Arnold estis membro de la Centra Estraro de

GDREA kaj ankaŭ aktivis ĝis 1990 en la Distrikta Estraro Berlin, li estis lingve tre talenta, multe tradukis. Restas multaj manuskriptoj nepublikigitaj. Li ankaŭ verkis ampleksan manuskripton pri fremdvortoj en Esperanto.

Jürgen Hamann, 1945-2014

Am 19.11. 2014 vertarb in Leipzig Jürgen Hamann. Er wurde am 26.04.1945 geboren. Jürgen war vor 1990 tätig u.a. als Bibliothekar, Instrukteur in der Bezirksleitung des Kulturbundes in Leipzig und Mitarbeiter am Rechenzentrum der Landwirtschaft in Markkleeberg.

Jürgen Hamann war lange Zeit Vorsitzender des Bezirksarbeitskreises Esperanto in Leipzig, später des Bezirksvorstandes von GDREA. Er war an der Organisation mancher Leipziger

Messetreffen und anderer Veranstaltungen beteiligt. Er war Mitglied des Zentralen Arbeitskreises Esperanto, später des ZV von GDREA. Er wirkte im Auftrag von GDREA in TEJO, in der MEM und in UEA. Er nahm an diversen Kongressen teil. Nach der Wende hatte er sich eine Zeit lang nicht mehr mit Esperanto befasst, sich der Sprache aber im letzten Jahrzehnt wieder zugewandt. So nahm er u.a. am 94. Esperanto-Weltkongress 2009 in Bialystok teil.

Dieter Berndt, 1935-2014

La 24-an de decembro 2014 forpasis Dieter Berndt (nask. 29.6.1935) en Berlin, kiu ĝis 1990 estis unu el la plej aktivaj esperantistoj en GDREA. Li gvidis multajn kursojn en Berlin, estis membro de la Distrikta Estraro de GDREA en (orienta) Berlino. Li verkis

kaj tradukis i.a. por la GDR-eldonoj de „Paco“, „der esperantist“, aparte multe por „Juna amiko“. Dieter Berndt, kiu ankaŭ regis la ĉeĥan, ofte kunorganizis aranĝojn en Ĉeĥio.

Detlev Blanke

Udo Jürgens kantis ankaŭ en Esperanto

Trafoliumante malnovajn jarkolektojn de la Berlina Informilo, mi tute hazarde trovis germanlingvan artikolon el la jaro 1971, kiun okaze de la ĵusa morto de la kantisto Udo Jürgens indas republikigi en sia originala formo. Ĝin verkis la tiama redaktoro de la Informilo Hans Breitenbach (1924-1980). Reserĉoj tamen evidentiĝas, ke tre verŝajne la du kantoj estis ja

sonregistritaj, sed neniam produktitaj kiel sondiskoj – pro nesufiĉa kvanto da antaŭmendoj. Eble iuj legantoj memoras pri tio kaj scias iom pli. Oni atentu la fajnan ironian tonon de la verkinto. La titolo aludas al la fakto, ke siatempe oni neniam sciis, kio rezultas el la apero de la vorto Esperanto en la publiko, nome plejofte moko kaj ridingigo.

Gerd Bussing

Die Katze im Sack

Wie wir hörten, wurden irgendwann in der Woche vom 24. bis zum 29. Mai die Aufnahmen der beiden von Udo Jürgens komponierten und von ihm jetzt auch in Esperanto gesungenen Schlager gemacht („Was ich Dir sagen will“ und „Ich glaube“, G.B.). Wir nähern uns also nun der Verwirklichung dieser mit so viel Gedöhns angekündigten Schallplattenproduktion. (...) Irgendwo sollen die Esperanto-Aufnahmen schon im Rundfunk gelaufen sein. Schade, dass wir sie nicht gehört haben. Wir werden aber diesmal mit weit weniger Skrupeln als bei sonstigen derartigen Gelegenheiten die Katze aus dem Sack im Sack kaufen können, denn von der Musik her sind ja diese Nummern schon hinreichend bekannt, und wir hoffen nun sehr, dass da jemand in Bayern dem Udo Jürgens wenigstens die richtige Esperanto-Aussprache beigebracht hat. Nun denn, – kauft, Leute, kauft!

Hans Breitenbach



UDO JÜRGENS:

Mi deziras al Esperanto multe da sukceso

Udo Jürgens ne nur deziras al Esperanto sukceson, li kantas en Esperanto.

La Esperanto-kantoj baldaŭ estos aŭdeblaj sur disko. Tiu disko trovis inter la esperantistoj jam grandan interesiĝon.

Mendu jam nun la diskon ĉe

Ludwig Pickel, Libroservo, Postfach 2113, D-85 Nürnberg 2

Finpretiĝas Jubilea Libro 2014

La alvokon kontribui al la Jubilea Libro „Esperanto – lingvo kaj kulturo en Berlino kaj Brandenburgio - 111 jaroj“ kiel daŭrigo de la Jubilea Libro el 2003 sekvis esperantistoj iom post iom dum la pasinta jaro.

La manuskripto preskaŭ havas la amplekson de la Jubilea Libro de 2003. Gerd Bussing kaj mi nun trarigardas la materialon kaj proponas al la aŭtoroj kelkajn korektojn kaj ŝanĝojn. Poste ankoraŭ devas esti aldonitaj resumoj en la ne uzita lingvo (germana au Esperanto) kaj farata kontrollegado de la tuta manuskripto.

Enestas jenaj kontribuoj:

Christiane Altrogge: Miaj Universalaj Kongresoj ~ *Peter Bäß:* Jarkomenca surprizo 2014 en Novkolonjo. Do Si Trang el Hanojo gastis en la Esperantokurso okazanta en Warthemahl / Berlin-Novkolonjo. ~ *Sibylle Bauer:* La Germana Esperanto-Arkivo en Berlino; Malgranda Berlina Literatura Festivalo kun Philipp Sonntag en septembro 2013 ~ *Torsten Bendias:* Pri akcepto de la libro „La Esperanto-Junularo en GDR“ de Torsten Bendias. Intervjuo ~ *Detlev Blanke:* La distriktaj organizaĵoj de GDREA kaj ĝiaj prezidantoj ĝis 1990; Helmut Krone (31.12.1932 – 28.02.2014); Postlasaĵo de d-ro Karl Schulze (1910-1983); La „Informilo por Interlingvistoj“ (Ipl) redaktata en Berlin; Bibliografio pri GDREA; Materialoj el la biblioteko de Wera kaj Detlev Blanke transdonitaj al

SAPMO; La germana interlingvistika societo „Gesellschaft für Interlinguistik e.V.“ (GIL) – evoluo post 2005; inkluzive kompletigo de kontribuoj pri Prof. Dr. Ignat Florian Bociort, d-ro Cyril Brosch, Prof. d-ro Georg-Friedrich Meier, d-ro Karl-Hermann Simon (1930-2011), Prof. Dr. Bengt-Arne Wickström kaj pri Terminologia agado ~ *Ed Borsboom:* Owe Fahlke, Vivo de Andreo Cseh – eltirajhoj el la chapitroj 4 kaj 7 pri agado de Cseh en Berlino en 1926 kaj 1931; *Angelika Dürre:* La asocio EsperantoLand prezentas du aranĝojn en Berlino: la Zamenhof-matenmanĝon kaj la Aremarondon. ~ *Will Firth:* Unua Ĉapitro el la romano „Tilla“ de Spomenka Ŝtimec (Edistudio, Pisa 2002). Germanlingva traduko el la Esperanto-originalo; *Michele Gazzola:* Lingva justeco kaj esperantismo ~ *Jessica Grasso:* Ludrondo en Kafejo Kibo ~ *Gerd Bussing:* ...preferas chiu-specajn ludojn (poemo) ~ *Edeltraut Henning:* Printempa Esperanto-Renkontiĝo en Prenzlau ~ *Andreas Jacobs:* La Zamenhofbiblioteko en la Domo de la Junularo en Potsdamo ~ *Lena Karpunina:* Aŭto-biografiaj tekstoj ~ *Goro Christoph Kimura:* Esperanto kiel punta lingvo inter germanoj kaj poloj ~ *Hans Moser:* Eta historia skizo de la Esperanto-grupo „Lietensee“ ~ *Ulrich Lins:* Morto en Auschwitz. Julius Glück kaj lia vivo por Esperanto ~ *Bernhard Pabst:* Berlina Komentario pri la Vortaro Oficiala de Esperanto ~ *Ronald Schindler:* Punta festo en Frankfurt (Odoro) en Germanio kaj Šubice en Pollando ~

Stephan Schneider: Kantotekstoj ~ *Roland Schnell*: Biografiaj tekstoj pri Karl Vanselow kaj Alfred Hermann Fried ~ *Encarna Teruel*: Mia konatiĝo kun Esperanto (E-o) ~ *Henryk Wenzel*: Memore al Lena Karpunina ~ *Dieter Wilke*: La muzika duopo “ĴeLe” ~ *Lena Wilke*: Kantotekstoj ~ *Fritz Wollenberg*: „La Rondiranto“ 1916-1919 – manskribita gazeto spegulas militon kaj pacon en Berlino; Pri Adolf Sproeck, Prof. D-ro Adolf Schmidt, D-ro Detlev Blanke, Prof. D-ro Viktor Falkenhahn, Arnold Zenkert (Potsdam) kaj Richard Schulz (Babelsberg), Karl Maier kaj aliaj; Poset, die Villa Kellermann und eine Medailenverleihung in Potsdam; Orte der Esperanto-Kultur (Zamenhofpark, Esperantoplatz, Esperanto-Kulturhaus, Kulturzentrum danziger50, Staatsbibliothek zu Berlin)

Historiaj tekstoj el la GEA-arkivo:

Karl Maier: Novjorko 9-a de decembro 1930. La unuaj impresoj; Berlin-Pankow, 13-a de januaro 1956. Letero al miaj ĉinaj geamikoj (Traduko el la angla lingvo: Jessica Grasso) ~ *Adolf Sproeck*: El la historio de nia Unuiĝo (Laborista Esperanto Unuiĝo Berlina) Fonto: La Rondiranto, 1916-1917 ~ *Theodor Richter*: Letero el Berlino, Fonto: La Rondiranto, 1916-1917;

Materialojn por la Jubilea Libro ni ricevis de:

Philippe Beaudonnet: Pri „Esperanto plenbuŝe“ ~ *Detlev Blanke*: Fotoj pri Esperanto en la lando Brandenburgio ~ *Edeltraut Henning*: Kroniko ~ *Sibylle Bauer kaj Johann Pachter*: Materialoj el la GEA-arkivo pri Berlino kaj Brandenburgio ~ *Wolf Krueger*: Materialoj pri lia agado kiel radioamatoro kaj esperantisto ~ Materialoj pri Ludmilla Hypius (Muzikpedagogino kaj esperantistino – antaŭe Eisenhüttenstadt, hodiaŭ Frankfurt Oder) ~ *Andreas Jacobs*: materialoj pri la Esperanto-Junularo en Potsdamo ~ *Detlev Hofmann*: materialoj pri Esperanto en Potsdamo ~ *Ronald Schindler*: materialoj pri Esperanto en Frankfurt / Oder, lando Brandenburgio, Berlino, Esperanto-aranĝoj en Germanio kaj Pollando (limregiono), Esperanto-Junularo en GDR, Brandenburgia Informilo

Mi aldonas ilustraĵojn kun informoj pri eventoj, personoj kaj temoj rilate al Esperanto en Berlino kaj Brandenburgio el mia propra kolekto kaj el arkivoj.

Tiu ĉi estiĝanta Jubilea Libro prilumas vastan historian dimension de la imperiestra tempo ĝis la nuntempo kaj estas atentokapta kompletigo de la libro el 2003.

Fritz Wollenberg

Ni konservu, pliriĉigu kaj modernigu nian Espotekon!

Ĝis en la okdekaj jaroj ekzistis la kutimo, aperigi la titolojn de libroj, kiuj estis donacitaj al la Espoteko, en nia Informilo. Mi proponas revivigi ĉi tiun tradicion per listo de (relative novaj) libroj, kiujn mi transdonis al la biblioteko inter novembro 2013 kaj februaro 2014. Ili ankoraŭ atendas sian

surbretigon. Tio estu klara signalo por nepra pluekzistado kaj konservado de nia valora libraro (inkluzive de son-diskoj, sonkasedoj ktp.).

Jen la unua parto de la listo (aŭtoro, titolo, aperjaro). Pluajn informojn pri la libroj oni ĉerpu el la interreto.

Gerd Bussing

1. Ĝura, Vualo de l' silento (1997)
2. Rublov, A.S. Puŝkin (2002)
3. Pystynen, Finnaj fragmentoj (1995)
4. Röllinger, Monumente pri Esperanto (1997)
5. Cherpillod, Konkiza etimologia vortaro de E-o (2007)
6. Mazi en Gondolando
7. Borsky, 1111 anekdotoj en E-o
8. (Div. aŭtoroj) 1825 – komploto (Rusa historio)
9. Bronŝtejn, Dek tagoj de kapitano Postnikov (2004)
10. De Seabra, Malamu vin, unu la alian (1996)
11. De Seabra, La armeoj de Paluzie (1996)
12. Sen Rodin, Nu, kaj do? (2010)
13. Julia Sigmond, Nomoj kaj sortoj (2010)
14. Lena Karpunina, Neokazinta amo (2007)
15. Sutton, Original Literature in Esperanto (2008)
16. Baudelaire, La floroj de l' malbono, trad. Waringhien
17. Simon, Lexicon Silvestre, nona pars (2013)
18. Bendias, Die Esperantojugend in der DDR (2011)
19. Wennergren, Detala gramatiko de Esperanto (2010)
20. Dahlenburg, Figuroj retorikaj en la beletro esperanta (2013)
21. Dahlenburg, Pli lume la mallumo zumas (2006)
22. Esperanto Charlkaro Tili, Esperanto-lernolibro kaj vortaro por uzbekoj (1998)
23. Koutny, Abunda fonto – memorlibro omaĝe al I. Szerdahely (2009)

Pri la nemalhaveblo de subjekto

Antaŭ nelonge mi estis petata revizii mallongan esperantlingvan tekston. En ĝi troviĝis jena frazo: “...ekloĝis kiel germana civitano en Varsovio, kie produktis dekojn da polaj filmoj.” Mi proponis korekti la frazon al „...kie li produktis ktp., argumentante, ke ankaŭ subpropozicio ja havu subjekton. Mia korespondanto kontraŭargumentis, ke „tamen laŭ la enciklopedia stilo frazoj povas esti laŭeble sen-subjektaj”.

Konsentite, en biografietoj oni ofte trovas ĉe laŭvicaj mencioj de faktoj el ies vivo frazojn kiel: „naskiĝis en...”, “translokiĝis al...”, aŭ, kiel en la supra citaĵo, “ekloĝis en...”, sen ripeto de la nomo, kiu ĉe la komenco estis ja

tutcerte menciita.

Tamen mi opinias, ke kie-subpropozicioj sen subjekto estas nekompletaj, eĉ en la t.n. enciklopedia stilo, ĉar en Esperanto, kontraste al pluraj aliaj lingvoj, la verba finaĵo ne montras la aganton. Speciale ĉe ruslingvanoj oni nemalofte trovas frazojn kiel: “ni eniris vendejon, kie aĉetis nigran panon” aŭ “ili trovis taŭĝan lokon, kie starigis siajn tendojn”. (Tion mi cetere ne diras moke – ankaŭ ni havas niajn tipajn eraretojn.)

En miaj gramatikoj mi nenion trovis pri tio kaj mem ne sukcesis konvinke vortumi miaj opinion.

Gerd Bussing

Naskiĝdatrevenoj

Ni gratulas al niaj membroj, kiuj festos sian naskiĝdatrevenon en la sekvaj du monatoj kaj deziras sanon kaj fortunon al:

Februaro:

Alisa Nikitina, Berlin
Andrzej Pacholski, Berlin
Angela Oehler, Berlin
Carola Langer, Jüterbog
Elisabeth Schwarzer, Berlin
Henryk Wenzel, Berlin
Irmgard Bärenz, Senftenberg
Kerstin Schüssler, Berlin
Paul Mätzig, Berlin
Sibylle Bauer, Berlin
Wolfram Riedel, Berlin,

Marto:

Christiane Altrogge, Berlin
Ina Tautorat, Berlin
Klaus Riedel, Finsterwalde
Lu v. Wunsch-Rolshoven, Berlin
Wera Blanke, Berlin

Se ni eraris, forgesis naskiĝdaton aŭ se vi ne volas ke via nomo aperas ĉi tie, bonvolu skribi al la redaktoro (mha)



Esperanto-Asocio Berlin- Brandenburgio kaj Esperanto-Ligo Berlino

invitas vin al la

Jara ĉefkunveno en Berlino

Loko: Kulturcentro Danziger 50

Adreso: Danziger Str. 50, 10435 Berlin, Prenzlauer Berg
(subtegmenta ateliero)

Dato:	<i>21-a de Februaro 2015</i>
-------	-------------------------------------

Programo:

14:00 h Alveno de la membroj kaj gastoj

14:30 h Komenco de la membrokunveno

- 1 Raporto de la estraroj 2014
- 2 Kasa raporto 2014
- 2.1 Kasa prognozo por 2015
- 3 Raportoj de la komisionoj
- 4 Raportoj el la grupoj
- 5 Diskuto pri la raportoj
- 6 Senŝarĝigo de la estraroj EABB/ELB
- 7 Balotoj por la novaj estraranoj ELB
- 8 Baloto por la nova estraro EABB
- 9 Propono, diskuto kaj decido pri statutŝanĝiĝo de ELB
- 10 Propono, diskuto kaj decido pri la Esperanto-domo Lichtenberg
- 11 Baloto por la komisiitoj
- 11.1 kasrevizoroj
- 11.2 plendokomisiono
- 11.3 varbado
- 11.4 komunikado
- 12 Eventoj kaj kampanjoj en 2015

18:00 h fino de la kunveno

Proponojn por voĉdonado en jarĉefkunveno bonvolu antaŭe sendi al la estraro.

Por ELB necesas, publikigi ilin 10 tagojn antaŭ la kunveno!!

Ni kore invitas ĉiujn membrojn de EABB kaj ELB kaj aliajn esperantistojn kiel gastojn.

Ronald Schindler, prezidanto de EABB kaj ELB

Tel.: +4915141419673, RonaldSchindler@web.de

Alveneblecoj

· publike: U2 Eberswalder Straße + M10 Husemannstraße

Raporto pri la membrokunveno decembro 2014

La eksterordinara membrokunveno al kiu la estraro invitis en la antaŭa eldono okazis la 6an de decembro en danziger⁵⁰. Venis dudeko da homoj por priparoli du gravajn tagorderojn:

La unua estis la propono ŝanĝi la statuton por sendependigi la Ligon de Germana Esperanto-Asocio (GEA). La proponinto Chuck Smith donis por tio tri kialojn.

1. GEA sen antaŭa interkonsento aŭ konsultado kun ELB decidis transloki sian oficejon kaj tiel grave ŝanĝis la lokajn cirkonstancojn por Esperantagado, kaŭzante multan neatenditan laboron al la Berlinanoj.

2. GEA en 2014 translokis sian servilon tiel ke la retejo de la Ligo dum kelkaj tagoj ne funkciis kaj daŭre malfunkcias (ekz. mankas preskaŭ ĉiuj bildoj).

3. GEA sen antaŭa averto de la ELB-estraro ŝanĝis la seruron en la klubejo kaj tiel preskaŭ malebligis okazigon de lingvokurso.

En la posta diskuto evidentiĝis tamen, ke la plimulto de la membroj same kiel la ELB-estraro preferas resti en la sino de la granda patrino GEA kaj tial Chuck retiris sian proponon favore al kompromisa solvo: laborgrupo prilumos la enkondukon de nova membrokategorio kies kotizoj ne forfluas al GEA sed restas plene en Berlin. La laborgrupon gvidas Paul Ebermann.

La dua laborgrupo kreiĝis dum la dua tagordero, kiu temis pri la estonteco de

la Esperanto-domo. La prezidanto de ELB prezentis la pasintajn evoluojn ĉirkaŭ la translokado kaj freŝajn informojn de GEA, kies prezidanto ofertis en retroŝto lokon por libroj en Kacbaŝstrato, tamen ne por ĉiuj libroj. Du oblaŝoj kaj malnovaj libroj restu en alia loko, ekz. en Herzberg. Laborgrupo gvidata de ELB-estraro Christoph Hoppe kaj Esperanto-domano Peter Kühnel pretigos planon tiucelan dum la sekva membrokunveno okazonta en februaro. Ĝis la fino de la lukontrakto (male al la unua atendo ĝi finiĝos nur la 30an de junio 2015) restos tiam espreble sufiĉe da tempo por pripensi kaj ekagi.

La tria laborgrupo kreiĝis por pri-labori kaj plibonigi la bibliotekon. Ses volontuloj troviĝis, kies taskoj estas ekzemple ordigo kaj enkatalogigo de la libroj. La laborgrupon estras Henryk Wenzel.

Dum la membrokunveno, tri membroj deklaris personajn eksiĝojn. Komence, Felix Zesch klarigis, ke li volonte cedus sian prezidantan postenon al alia aktivulo. Due, Roland Schnell deklaris sian malkontenton pri la nova statuto kaj sian tutan eksiĝon el la organizita Esperanto-movado. Trie, Paul Ebermann anoncis, ke li ne re-kandidatiĝos por la plendokomisiono en la sekvaj balotoj.

Tri argumentoj kontraŭ GEA, tri laborgrupoj kaj tri eksiĝanoncoj. Ĉu trio tiu plaĉos al ĉiu?

Felix Zesch

Kiu estos la nova prezidanto de ELB?

Kiam mi estis elektita prezidanto en 2011, mi volis antaŭenigi nian asocion kaj nune kun aliaj aktivuloj ni atingis multe: En 2011 ni modernigis la retejon al komune redaktebla kaj aktuala repaĝaro, kaj tiel plibonigis grave nian prezenton eksteren. En 2012 ni organizis la Komunan Esperanto-Kongreson en Berlin kune kun danoj kaj poloj kaj tiel kontribuis aparte al la aplikado de Esperanto. En 2013 ni modernigis la statuton kaj tiel harmoniigis nian enplektigon en GEA. En 2014 post longa klopodado ni elpagigis finfine la heredaĵon de Karl Maier, dank' al kiu nia asocio nun ĝuas ioman financan liberecon. En 2014 tamen okazis neplanitaj aferoj. Unue, nia retejo difektiĝis pro malbone planita translokado al esperanto.berlin, kio ĝenas ĝis hodiaŭ. Plej restos en la memoro la decido de GEA transloki sian oficejon for de Einbecker Straße 36, malcertigante la estontecon de la projekto Esperanto-domo.

Kiam mi kandidatiĝis por la prezidanta ofico de ELB kaj EABB en 2011, mi estis parttempe dungita, sen infanoj en luata loĝejo, do kun relative multa libera tempo. Tiam sufiĉe regule okazis estrarkunsidoj kaj mi ofte persone ĉeestis aranĝojn de la diversaj grupoj. Hodiaŭ, mi laboras plentempe, havas du etajn infanojn kaj ekde mallonge renovigatan domon. Tiuj ŝanĝoj en mia privata vivo kaj en mia disponebla libertempo kaŭzis tion, kion verŝajne multaj el vi spertis en la pasintaj monatoj: Mi apenaŭ partoprenas Esperanto-

aranĝojn en Berlin kaj la estrara laboro okazas ĉefe virtuale. Mi preferas fari aferojn rete, ĉar tio postulas malpli da tempo por mi kaj ebligas al mi prilaboron je tempoj por mi oportunaj. Por multaj al vi gravas tamen tre la persona kontakto kaj ankaŭ mi opinias, ke la prezidanto de loka grupo devus esti pli videbla ol mi nun estas.

Ankaŭ la aliaj estraranoj laboras plentempe. Ankaŭ Marc el Potsdam havas du infanojn, Ronald loĝas en Frankfurt/Oder. Christoph laboras multe. En nia klubo estas multaj pensiuloj, kiuj havas klare pli da libera tempo ol la estrarano kaj ili deziras pli da personaj engaĝiĝoj kaj videbleco de la estraranoj. La malbalanco inter tiuj, kiuj estas en ofico kun malmulta libertempo kaj tiuj, kiuj estas sen ofico kun multa libertempo estas eble iugrade la kerno de la malkontento pri la estraro, pri kiu mi ĉiam pli kaj pli legis kaj aŭdis.

Pro tio mi alvokas homojn kun pli da disponebla libera tempo ol mi, kandidatiĝi por la posteno de la prezidanto de la Esperanto-Ligo Berlin. Mi ne gluiĝas je la ofico kaj volonte liberigas la seĝon por alia aktivulo.

Felix Zesch

Ambaŭ tekstoj, pri la eksterordinara membrokunveno en decembro kaj la alvoko por kandidati kiel prezidanto de nia asocio, estas skribitaj antaŭ la malmembriĝo de Felix Zesch.

(mha)

Vorschlag zur Änderung der Satzung der Esperanto-Liga Berlin

Auf der letzten Mitgliederversammlung der Esperanto-Liga Berlin (ELB) am 6. Dezember 2014 wurde ein Vorschlag zur Änderung der Satzung diskutiert, und dann zurückgezogen.

Auf Basis dieser Diskussion schlagen wir jetzt eine Änderung der Satzung vor, die (soweit möglich) allen vorgebrachten Gesichtspunkten Rechnung trägt.

Zunächst der formale Text des Vorschlages (nur auf Deutsch, weil die Satzung nur deutschsprachig ist), danach folgt etwas allgemeine und dann detaillierte Erläuterung.

Für die Kommission zur Satzungsänderung

Paul Ebermann

Dum la lasta membrokunveno de Esperanto-Ligo Berlin (ELB), la 6an de decembro 2014, propono por ŝanĝo de la statuto estis diskutita kaj poste retirita.

Baze de tiu diskuto ni jen proponas ŝanĝon de lastatuto kiu (laŭeble) kontentigas ĉiujn tiam menciitajn vidpunktojn.

Unue ni prezentos la formalan tekston de la propono (nur en la germana, ĉar la statuto estas nur germanlingva), poste sekvos ĝenerala kaj detala klarigo.

Por la komisiono pri statutŝanĝo

Paŭlo Ebermann

Änderungsvorschlag

Paragraph 4 der Satzung (Mitgliedschaft) wird wie folgt neu gefasst:

4. Mitgliedschaft

4.1 Der Verein hat Bundesmitglieder, örtliche Mitglieder und Ehrenmitglieder. Bundesmitglieder und örtliche Mitglieder werden zusammen auch als ordentliche Mitglieder bezeichnet.

4.2 Bundesmitglieder müssen ordentliche Mitglieder des Deutschen Esperanto-Bundes e.V. (Berlin) nach dessen Satzung sein. Sie müssen keinen zusätzlichen Beitrag zahlen.

4.3 Örtliche Mitglieder sind natürliche Personen, welche einen Mitgliedsbeitrag zahlen, dessen Höhe in einer von der Mitgliederversammlung beschlossenen Beitragsordnung festgelegt wird.

4.4 Ordentliche Mitglieder werden auf schriftlichen Antrag durch den Vorstand, in strittigen Fällen durch die Mitgliederversammlung aufgenommen.

4.5 Ehrenmitglieder werden durch die Mitgliederversammlung aufgenommen, und müssen keinen Beitrag zahlen.

- 4.6 Die Mitgliedschaft endet durch Austritt, Streichung aus der Mitgliederliste, Ausschluss oder Tod, bei Bundesmitgliedern ferner durch die Beendigung der ordentlichen Mitgliedschaft im Deutschen Esperanto-Bund e.V. (Berlin) nach dessen Satzung.
- 4.7 Der Austritt ordentlicher Mitglieder ist nur zum Jahresende möglich. Er muss dem Vorstand schriftlich erklärt werden. Örtliche Mitglieder, die mit der Zahlung des Beitrags trotz zweimaliger Mahnung im Rückstand sind, können aus der Liste der ordentlichen Mitglieder gestrichen werden.
- 4.8 Wenn ein Mitglied grob oder nachhaltig gegen die Satzung oder gegen die Interessen des Vereins verstößt, kann es durch Beschluss des Vorstands, in strittigen Fällen durch die Mitgliederversammlung ausgeschlossen werden. Der Ausschluss ist dem Betroffenen schriftlich unter Angabe der Gründe mitzuteilen.
- 4.9 Einzelmitglieder können sich zu Gruppen zusammenschließen. Die Gruppen können sich nach örtlichen, fachlichen, politischen, religiösen und weltanschaulichen Gesichtspunkten bilden und sich eine eigene Satzung und Beitragsordnung geben, die der Bestätigung durch den Vorstand bedarf.
- 4.10 Natürliche Personen, welche nicht Mitglied werden wollen oder können, sowie juristische Per-

sonen, können den Verein als Förderer unterstützen, mit einem Mindestbeitrag, welcher in einer von der Mitgliederversammlung beschlossenen Beitragsordnung festgelegt wird.

Paragraph 6.1 wird wie folgt neu gefasst:

6. Mitgliederversammlung

- 6.1 Die Mitgliederversammlung ist das oberste Organ des Vereins und Mitgliederversammlung nach § 32 BGB. Stimmberechtigt sind:
- a) die ordentlichen Mitglieder, die die Beiträge für das laufende Jahr bezahlt haben,
 - b) Ehrenmitglieder.
- Förderer nach 4.10 haben Rederecht, aber kein Stimmrecht auf der Mitgliederversammlung.

Paragraph 10/11 wird wie folgt neu gefasst:

11. Schluss- und Übergangsbestimmungen

Diese Satzung tritt mit Eintragung in das Vereinsregister in Kraft und ersetzt die bisherige Satzung von 2013. Bis zu den nächsten Wahlen nach der Eintragung dieser Satzung bleiben alle nach der bisherigen Satzung gewählten Amtsträger in ihren Ämtern. Ordentliche Mitglieder nach der bisherigen Satzung werden mit der Eintragung dieser Satzung zu „Bundesmitgliedern“ nach 4.2.

Nova konto de la Ligo

Nia ĝisnuna konto ĉe Postbank kostis nin jare 120 EUR. Tio signifas, ke la kotizorepagon de 12 membroj ni uzis nur por administraj celoj kaj por plenumi nian bezonon havi konton. Tiun elspezon ni nun povis malaperigi estonte, ĉar ni trovis senpagan konton por komunitilaj asocioj ĉe DKB. Bv. do estonte ĉiam uzi nur nian novan kontoligon:

Esperanto-Liga Berlin,
IBAN: DE45 1203 0000 1020 2018 67,
BIC: BYLADEM1001

Bonvolu kontroli, ĉu vi jam ĝiris vian membro-kotizon por la pasanta jaro kaj sam-tempe jam instigas vin pagi por 2015 por plifaciligi la administradon. Membrokotizoj pagendas rekte al la Germana Esperanto-Asocio, kiu transprenis nian membroadministradon. La koncerna konto-numero estas

IBAN DE32 5085 1952 0040 1145 71.

La regula kotizo estas 72 EUR. Anticipan dankon!

Felix Zesch

Vorschläge für eine Beitragsordnung der Esperanto-Liga Berlin

Gemäß der vorgeschlagenen Änderung der Satzung werden die Mindest-Beiträge für örtliche Mitglieder und Förderer in einer Beitragsordnung festgelegt, welche von der Mitgliederversammlung beschlossen wird.

Da wir uns in der Kommission zur Satzungsänderung nicht auf einen Vorschlag einigen konnten, präsentieren wir hier zwei extreme Vorschläge.

Die Mitgliederversammlung kann einen von ihnen auswählen, andere Zahlen einsetzen, oder entsprechend der Diskussion einen anderen Text beschließen.

Für die Kommission zur Satzungsänderung

Paul Ebermann

Proponoj de kotizo-regularo por la Esperanto-Ligo Berlin

Laŭ la proponita ŝanĝo de la statuto, la minimumaj kotizoj por la lokaj membroj kaj por la subtenantoj estas fiksita en kotizo-regularo, kiu estas decidenda de la membrokunveno.

En la komisiono pri statutŝanĝo ni ne povis konsenti pri unu propono, tial ni ĉi tie prezentas du ekstremajn proponojn.

La membrokunveno povas elekti unu el ili, enmeti alian nombrojn, aŭ ŝanĝi la tekston entute laŭ la surloka diskuto.

Por la komisiono pri statutŝanĝo

Paŭlo Ebermann

Vorschlag 1

Beitragsordnung der Esperanto-Liga Berlin e.V.

1. Bundesmitglieder nach Punkt 4.2 der Satzung müssen keinen zusätzlichen Beitrag an die ELB zahlen (zusätzliche Spenden sind aber jederzeit willkommen).
2. Örtliche Mitglieder nach Punkt 4.3 der Satzung
 - a) mit eigenem Einkommen zahlen einen jährlichen Beitrag von mindestens 72 €,
 - b) ohne eigenes Einkommen zahlen einen jährlichen Beitrag von mindestens 36 €.
3. Förderer nach Punkt 4.10 der Satzung
 - a) mit eigenem Einkommen zahlen einen jährlichen Beitrag von mindestens 72 €,
 - b) ohne eigenes Einkommen zahlen einen jährlichen Beitrag von mindestens 36 €.
4. Die Einteilung nach »mit eigenem Einkommen« und »ohne eigenes Einkommen« nimmt jedes Mitglied bzw. jeder Förderer selbst vor, es wird nicht von der ELB kontrolliert.

Vorschlag 2

Beitragsordnung der Esperanto-Liga Berlin e.V.

1. Bundesmitglieder nach Punkt 4.2 der Satzung müssen keinen zusätzlichen Beitrag an die ELB zahlen (zusätzliche Spenden sind aber jederzeit willkommen).
2. Örtliche Mitglieder nach Punkt 4.3 der Satzung
 - a) mit eigenem Einkommen zahlen einen jährlichen Beitrag von mindestens 30 €,
 - b) ohne eigenes Einkommen zahlen einen jährlichen Beitrag von mindestens 15 €.
3. Förderer nach Punkt 4.10 der Satzung
 - a) mit eigenem Einkommen zahlen einen jährlichen Beitrag von mindestens 30 €,
 - b) ohne eigenes Einkommen zahlen einen jährlichen Beitrag von mindestens 15 €.
4. Die Einteilung nach »mit eigenem Einkommen« und »ohne eigenes Einkommen« nimmt jedes Mitglied bzw. jeder Förderer selbst vor, es wird nicht von der ELB kontrolliert.

Pro manko da spaco bonvolu viziti <http://esperanto.berlin>
por aktualaj datoj.

Kontaktoj

Germana Esperanto-Asocio

Katzbachstr. 25, 10965 Berlin

tel.: 030 510 629 35, infozentrum[ĉe]esperanto.de

IBAN DE32508519520040114571, BIC: HELADEF1ERB

Esperanto-Asocio Berlin-Brandenburgio kaj Esperanto-Liga Berlin e.V.:

Einbecker Straße 36, 10317 Berlin

tel.: 030 818 091 12, eabb[ĉe]esperanto.de

IBAN: DE45 1203 0000 1020 2018 67, BIC: BYLADEM1001

Vicprezidanto: Ronald Schindler

EsperantoLand e.V.

Lu Wunsch-Rolshoven, tel.: 030 685 5831, esperantoland[ĉe]esperantoland.de,
www.EsperantoLand.de

Esperanto? Plenu! - praktikada tablorondo

Philippe Beaudonnet, tel.: 030 217 562 33, philippe.beaudonnet[ĉe]gmx.net

Jxaŭda Rondo

renkontiĝejo: Einbecker Straße 36, 10317 Berlin, tel. 030 428 578 99

Grupo Lietzensee

Hans Moser, tel.: 030 8621411

Esperanto-Infomilo por Berlino kaj Brandenburgio estas la oficiala organo de Esperanto-Asocio Berlino-Brandenburgio r. a.

Eldonas/Herausgeber:

Esperanto-Asocio Berlino-Brandenburgio r. a. Esperanto-Vereinigung Berlin-
Brandenburg e. V.

Responsas/V.i.S.d.P.:

Ronald Schindler, vicprezidanto

Einbecker Str. 36 · 10317 Berlin – www.esperanto.berlin · eibb [ĉe] esperanto.de

Enpaĝigis/Satz:

Marc Hanisch (*mha*) · Farita per Scribus (<http://scribus.net>)

Litertiparo/Schrift: Gentium (<http://scripts.sil.org>)

En la artikoloj nur esprimiĝas la opinioj, deklaroj, rekomendoj ktp. de la poaj aŭtoroj, ne de la asocioj, estraroj ktp. aŭ de la responsulo, krom alia estas eksplacite indikata.

La redakta limdato por la venonta numero estas la 8-a de marto 2015.